

revuo


esperanto

februaro 1966

59-a jaro

n-ro 723 (2)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 21 Lerni el siaj malsukcesoj (Sadler)
- 22 Oriento kaj Okcidento interproksimiĝis (VS)
- 24 Preskaŭ 700 000 individuoj subskribis
- 25 Ĉu vi volus lerni dormante? (Unesko)
UEA: komunista agente de usona imperiismo!
Citaĵoj
- 26 La lingvoj de Oceanio (Capell)
- 28 La grafikarto de Ferenc Lajos (Szathmári)
- 31 "Beta Splendens" (Felix)
- 32 Recenzoj
- 33 Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologoj Roost, Sandroek
Leteroj
- 34 51-a Universala Kongreso, Budapeŝto, 1966
La internacia ekzameno
- 35 Mallongaj novaĵoj
- 36 La Juna Vivo
22-a IJK de TEJO, Pécs, 1966
- 37 En la grupoj
Esperanto en radio
UEA eldonis libro-katalogon
- 38 Memoriga kalendaro
Oficiala informilo n-ro 387
- 39 La internaciaj konkursoj 1965
- 40 Anoncetoj

kovrila bildo

William Shatner ĉefrolas en la nova sciencofikcia filmo "Inkubo", kun dialogo en Esperanto (Foto: Waystar-Contempo III)

bildojn liveris

- 34 Jurica tibor
- 37 M. Givoje

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Girkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1966): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

esperanto
februaro 1966

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Regas ĝenerala konsento, ke la tutmonda informado pri la Internacia Lingvo, malgraŭ la granda stimulo, kiun donis al ĝi la Jaro de Internacia Kunlaboro, multe postrestas kompare kun la aliaj ĉefaj branĉoj de agado: instruado kaj praktika aplikado. Estas rekonita principo (vidu ekzemple en la "Principaro de Frostavallen"), ke ni devas samtempe dediĉadi egalan atenton al ĉiuj tri: informado, instruado kaj aplikado, se ni volas firme progresigi la lingvon. Lamado de unu aspekto povas senvalorigi la atingojn en alia.

Ĉiuj, kiuj kolektis subskribojn por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj dum la pasinta jaro, certe konsentos, ke ĝi donis vere bonajn okazojn por informi vastan publikon pri Esperanto. La daŭrigo de la kolektado dum la unua duono de 1966 signifas do, ke la antaŭenpuŝo, kiun la afero donis al nia informa laboro, estos ankoraŭ pli granda. Sed tio en si mem ne sufiĉas. Ankaŭ antaŭaj kompareblaj okazoj — la 70-jara datreveno de Esperanto en 1957, la Zamenhof-jaro en 1959 kaj tiel plu — alportis rimarkeblan *intensigon* de la informado, sed ŝajne ne rezultigis ian daŭran *plibonigon* de la laboro.

Surdaj informantoj

Kelkfoje oni opinias, ke por diskonigi la Internacian Lingvon necesas nur intensigi la agadon. Sed oni forgesas, ke tio povas foje havi malan efikon! Se, ekzemple, iu informfolio ne utilas por konvinki la publikon pri Esperanto, duobligo de la eldonkvanto ne povas doni pli da utilo, ĉar la duoblo de nulo tamen restas nulo. Eĉ pli grave, se per maltaŭga aŭ erara informado pri Esperanto oni ĝis nun forpelis multajn interesigantojn, tiam evidente per intensigo de tiuj samaj eraraj metodoj oni nur sukcesos forpeli ankoraŭ pli multe da homoj kaj plue kompromiti la lingvon.

Eĉ en tiuj kazoj, kie la ĝisnuna agado estas ĝenerale utila kaj pozitiva, la informantoj ofte similas al surdaj oratoroj, kiuj daŭre ripetatas la samajn argumentojn en la sama formo, nenion sciante pri la kritikoj kaj kontraŭargumentoj, kiuj aŭdiĝas el la publiko. Sed ĝuste tiuj kritikoj, tiuj reagoj de la publiko estas la ŝlosilo por daŭra plibonigo de la informado.

Informado estu cirkla proceso

Same kiel en ĉiuj aliaj procesoj, plibonigo de la informa laboro estas ebla nur ekde la momento, kiam oni komencas kompari la atingatajn rezultojn kun la origina intenco. Kompreneble necesas ie iniciati la proceson, kaj oni povas, ekzemple, jam anticipe adapti informojn por la gazetaro al la karaktero de la koncernaj gazetoj. Sed tro ofte la proceso tie haltas: la informoj estas plue dissendataj al la

gazetaro, sed sen ia adekvata kontrolo, ĉu la verkinto aŭ adaptinto sukcesis en siaj klopodoj, kaj ĉu la informoj sendataj plene kontentigas la koncernajn redaktorojn. Ideale necesas unue studi la medion, al kiu oni direktas la informadon; due, konformigi laŭeble la informojn al la karaktero de tiu medio; trie, zorge konstati la rezultojn de la informado; kvare, modifi la informojn laŭ la konstatitaj rezultoj. Mallonge: necesas tuta cirklo da agoj, kiu per si mem certigos la plibonigon de la laboro.

Praktikaj sekvoj

Tiu ĉi principo havas siajn sekvojn sur ĉiu kampo de la informado: personaj kontaktoj, presitaj informiloj, prelegoj, ekspozicioj, artikoloj, informoj kaj leteroj al la gazetaro — ĉio estas plibonigebla, se nur oni atentigas la rezultojn je ĉiu stadio de la laboro.

Tro ofte persono, kiu renkontis malsukceson en siaj klopodoj diskonigi Esperanton, sen plua esploro konkludas, ke "la publiko estas apatia" aŭ "la medio estas malfavora", dum la malsukceso povus ŝuldiĝi al lia propra sinteno, eble tro truda aŭ tro humila... En tia kazo oni eksperimente adoptu alian sintenon kaj komparu la rezultojn.

Redaktinte tekston por informfolio aŭ broŝuro, oni povas jam antaŭ la presigo prezenti ĝin al kelkaj amikoj neesperantistoj kaj peti ilian senkompatan kritikon. Povas esti, ke tio evidentigos iun preterlason aŭ malklaraĵon, kiun esperantisto mem ne rimarkus. Same, post la apero de tia informilo, oni devus noti ĉiujn kritikojn aŭ miskomprenojn por tiel povi plibonigi la tekston okaze de reeldono. Distribuante kun informa broŝuro respondo-karton, kiel tion faris Germana Esperanto-Asocio kaj Brita Esperantista Asocio, oni povas ricevi tute konkretan bildon pri ĝia efiko. Plie, se oni disponas du malsamajn informilojn, oni povas, aldonante al ambaŭ la saman respondo-karton, decidi favore al unu aŭ la alia laŭ la nombroj de respondoj ricevataj.

Eble plej facila estas tiu kontrolado kaj plibonigado, kiam temas pri gazetaraj servoj. BEA, ekzemple, havas gazetaran fakon, kiu sisteme kolektas el la brita gazetaro informojn pri Esperanto aŭ la lingva problemo, kaj en ĉiuj taŭgaj okazoj send(ig)as leteron por publikigo. Tiel ĝi povis konstati, ekzemple, ke en iu trimonata periodo aperis 192 tiaj mencioj. En 73 kazoj BEA reagis per letero, kaj el tiuj leteroj 42 aperis.

Ankaŭ la informa laboro de UEA, ekzemple la bultenoj de la Internacia Gazetara Servo, povus certe pliboniĝi, se ni pli bone sciis la rezultojn kaj laŭ ili povus modifi la enhavon de la bultenoj. Jen unu kampo, sur kiu ĉiu membro povas helpi: sendante al la Centra Oficejo ĉiujn informojn el la IGS, kiuj aperas en la gazetaro en aliaj lingvoj. V. Sadler

ORIENTO KAJ OKCIDENTO INTERPROKSIMIĜIS

SED MULTAJ KULTUROJ RESTIS NEKONATAJ

Jam dum preskaŭ 10 jaroj UEA kaj la pli vastaj tavoloj de la Esperanto-movado atente sekvas la nun finiĝontan Projekton de Unesko "Oriento-Okcidento". Per prelegvojaĝoj kiel tiu de Joŝiko Kajino (sube), per libro-serio kaj aliaj rimedoj, Esperanto daŭre servas por interproksimigi antipodajn popolojn.



Dum la pasinta jardeko la esprimo "Oriento-Okcidento" firme establiĝis en la Internacia Lingvo. Por la plimulto de legantoj ĝi pensigas tuj pri la libro-serio sub tiu titolo, kiun aŭspicias UEA, pri la sukcesaj seminarioj en Frostavallen kaj Londono kaj, evidente, ankaŭ pri Unesko, ĉe kiu ĝi havis sian originon.

En Delhio, en 1956, Unesko starigis tiun Grandan Projekton pri Reciproka Aprezado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj, kiu diskoniĝis pli populare sub la mallongigo Projekto Oriento-Okcidento. Nun baldaŭ, laŭplane, tiu Projekto ĉesos ekzisti. Ĉu tio do signifas, ke ĉesos la agado de Unesko sur tiu kampo? Ĉu devos ĉesi la apogo de UEA al tiu klopodo proksimigi spirite la plej mal-similajn popolojn unu al alia? Kio fariĝos el la serio Oriento-Okcidento?

Feliĉe, pri ĉesigo ne temas. Kvankam mal-aperos la Projekto Oriento-Okcidento, la kulturaj interŝanĝoj, kiujn ĝi ampleksis, fariĝos parto de multe pli vasta programo, esenca aspekto de ĉiuj agadoj de Unesko: la "Reciproka Studo kaj Aprezado de Kulturoj". El tiu kvazaŭ-eksperimenta, nur dek-jara Projekto por interŝanĝoj inter Oriento kaj Okcidento elkreskos do konstanta kultura laboro, kiu devos ampleksi ĉiujn kontinentojn kaj ĉiujn kulturojn senescepte. En tiu pli vasta laboro partoprenos ĉiuj fakoj kaj konsiderinda parto de la financaj rimedoj de Unesko. Kaj, sendube, plue partoprenos ne nur UEA sed la tuta Esperanto-movado, por kiu la interekkono de kulturoj estas en la fundamento mem de la ideo de internacia lingvo.

Kion fakte atingis Unesko?

En decembro 1965 okazis en Parizo speciala kunveno, al kiu UEA sendis observanton, por pesi la rezultojn de la Projekto Oriento-Okcidento kaj rekomendi, kiel plej bone daŭrigi la laboron sub la nova, pli vasta tegmento. Ĝi povis konstati tutan aron da utilaj atingoj — kaj ankaŭ, neeviteble, kelkajn ankoraŭ nesolvitajn problemojn.

Elstaras la Unesko-serio de reprezentaj verkoj, el kiu la grandan plimulton konsistigas tradukoj en la anglan kaj francan (la du oficialaj lingvoj de Unesko) el la literaturoj de Oriento. Dum la 10 jaroj de la Projekto aperis meze 10 libroj ĉiujare en tiu serio. Plej multaj tradukoj estis el hindaj lingvoj (21 verkoj) kaj el la ĉina (20). Kvankam aperis ankaŭ tradukoj el okcidentaj lingvoj en hindaj kaj aliaj lingvoj de Oriento, oni ĝenerale opinias, ke Oriento jam disponas pri sufiĉe abunda tradukaro el okcidentaj literaturoj, sed ke necesas urĝe pligrandigi la fluon de Oriento al Okcidento.

La kunvenantoj en Parizo opiniis, ke precipe sur la kampo de lernejoj la Projekto atingis grandajn kaj daŭripovajn sukcesojn. Oni pers- vadis al edukaj aŭtoritatoj en multaj landoj inkluzivi en la lernejajn programojn pli da instruoj por foraj landoj kaj kulturoj. Oni povis kontroli ekzemple lernolibrojn pri azia geo-

grafio, eldonitajn en diversaj eŭropaj landoj, fare de hindaj, japanaj, pakistanaj kaj tajlandaj geografoj, kiuj do povis korekti neĝustajojn kaj proponi aldonojn pri la propra lando. La samon oni faris ankaŭ en la inversa senco. Pli frue ofte okazis, ke lernolibroj pri azia historio, verkitaj de eŭropanoj, pritraktis nur la historion de la koloniisma epoko.

Tria grava atingo estis la starigo de regionaj centroj en diversaj landoj de Oriento, kies tasko estas pristudi kaj diskonigi la kulturojn de la koncernaj regionoj. Tiaj centroj nun jam ekzistas en Tokio (orientazia kulturo), Delhio (sudazia kulturo), Teherano (irana kulturo) kaj kunligitaj en Bejruto, Damasko kaj Kairo (araba kulturo). Ili jam faris grandan kontributon por konatigi Azion al la okcidenta mondo.

Oni povus paroli ankoraŭ pri interŝanĝoj de personoj, precipe studentoj per specialaj stipendioj, pri interkontinentaj konferencoj, pri bibliografiaj laboroj, ekspozicioj, filmoj kaj unuarangaj Muzik-Antologio de la Oriento kaj Muzik-Antologio de Afriko, registritaj sur diskoj.... ĉio iniciatita sub la Projekto de Unesko; sed tio jam troampleksigus ĉi tiun artikolon. Anstataŭe ni konsideru, kion ni ĝis nun atingis per Esperanto dum la dek jaroj de tiu Projekto, kaj kiun direkton tiu laboro prenu estontece.

Popularigo de la Projekto

Ekde kiam UEA akceptis la inviton de Unesko kunlabori en la Projekto Oriento-Okcidento, ĝi faris multon por diskonigi la aferon kaj por veki ĉe la esperantistoj novan interesigon pri kulturaj studoj kaj interŝanĝoj. Kiu volus scii la detalojn, tiu sin turnu al la Raportoj de la Estraro en la Jarlibro de UEA. Ĉi tie sufiĉu menci la Kongresajn Sekciojn pri tiu temo (1958-60 kaj 1965), la seminariojn sub aŭspicio de UEA en Frostavallen (1959, 1962) kaj Londono (1961) kaj la diversajn prelegvojaĝojn, ekzemple tiun de Joŝiko Kafino.

Nova vigliĝo de kultura eldonado

La efikon de tiu popularigo oni jam komencas senti el diversaj flankoj. La Esperanta gazetaro respegulis la kreskantan interesigon, la eldonistoj ekkuraĝis prezenti pli da verkoj el relative nekonataj literaturoj, kaj almenaŭ unu eŭropano, reveninte el la epokfara Universala Kongreso en Tokio, tuj aĉetis en sia entuziasmo ĉiujn japanajn librojn nun troveblajn en Esperanta traduko.

En la avangardo de tiu movado estis kaj restas la Serio Oriento-Okcidento: *Malsata Ŝtono*, *Rakontoj de Oogai*, *La Naŭzo*, *Kalevala*, *Dia Komedio*, kaj nun *Martín Fierro* kaj *Reĝo Lear*. Sed granda nombro da eldonaĵoj ekster tiu serio same kontribuis por plivastigi la perspektivojn de la Esperanta literaturo. Se menci nur la orientajn: *Noveloj de Lusin*, *Aŝma*, *La libro de teo*, *Japanaj malnovaj rakontoj*, *La obstino*, *El japana literaturo*, *Mannjoo-ŝuu*, *Ĉina Antologio*, *Rakontoj pri fantomspitantoj*, *La monto de l' virino*, *Poemoj*

de To Huu... ĉiuj aperis dum la periodo de la Granda Projekto.

En 1964 la librolisto en la Jarlibro de UEA ekhavis novan aspekton, kiu — ne malgrava afero — permesas al interesiganto pri unu difinita kulturo rapide eltrovi ĉion nun akireblan: ekzemple ĉiujn tradukojn el ĉina literaturo, aŭ ĉiujn geografiajn librojn pri Azio. Valorega helpilo al tiaj studantoj estas ankaŭ la bibliografioj de naciaj literaturoj en Esperanto, kiuj ampleksas ankaŭ ne plu aĉeteblajn verkojn kaj tradukojn aperintajn en revuoj. Nur en la pasinta jardeko aperis tiaj bibliografioj japana, dana, jugoslava kaj norvega, dum ankaŭ hinda estas jam prespreta. Fine, estus nepardoneble preterlasi la Enciklopedieton Japanan, kiu elstare riĉigis nian scion kaj vortprovizon rilate japanan kulturon. Ankaŭ religiaj terminaroj — katolikaj kaj budhisma — iom kontribuis en tiu direkto.

Ankoraŭ restas malekvilibro

Kion ni devus antaŭvidi kiel nian estontan agadon laŭ la spirito de la Projekto Oriento-Okcidento?

Unue, necesus sekvi la ekzemplon de Unesko, klopodante reciproke konatigi ne nur la kulturojn de Oriento kaj Okcidento, sed ĉiujn kulturojn de ĉiuj popoloj, kaj precipe tiujn, kiuj ĝis nun restis neatingitaj de la Internacia Lingvo. Per Esperanto oni povas hodiaŭ ekkoni multajn kulturajn valorojn, tamen iuj regionoj restis apenaŭ tuŝitaj. Kiam estos taŭge reprezentita la vasta araba literaturo, aŭ la moderna verkado de junaj afrikanoj (ĉi-lastaj plejparte en la angla kaj franca originale)? Kompreneble, ankaŭ la disvastigo de Esperanto en regionoj, kie ĝi estas malpli konata, apartenas esence al la klopodado eltiri ties kulturojn el la neglekto kaj fermiteco. Ankoraŭ restas malekvilibro en la disvastiĝo de Esperanto, same kiel en la relativa konateco de la kulturoj, kaj ofte la du fenomenoj koincidas.

La Unua Labora sekcio de la Universala Kongreso en Tokio, kiu diskutis la Projekton Oriento-Okcidento, faris plurajn konkretajn sugestojn por la estonteco: pri novaj libroj, bibliografioj kaj terminaroj, regionaj komisiitoj, prelegvojaĝoj kaj pli intensaj kontaktoj inter la lokaj Esperanto-societoj por kulturaj celoj. (Vidu sept-okt. 1965, p. 166). Al tiuj oni povus aldoni ankoraŭ plurajn aliajn: pri helpo al lingvo-studoj per Esperanto (kion "Esperanto" klopodas stimuli per sia nuna artikol-serio), pri stimulo al ponto-tradukado per Esperanto (ekzemple traduki aziajn librojn el Esperanto en eŭropajn lingvojn), pri abonado al alikontinentaj revuoj (eŭropano al la japana "Kajero", japano al "Norda Prismo", k.s.), pri plivastigo de lernejoj interŝanĝoj ktp.

"Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia" — tiel skribis Zamenhof. Same pri kulturo, tiel intime dependa de la lingvo. Estas nia privilegio kaj morala devo, aktive labori por la reciproka konatigo de ĉiuj kulturoj de la mondo.

V.S.



Nova svingo de la kolektado

"Ĝoje mi akceptas vian informon pri daŭrigo de kolektado de la subskriboj. Bonvolu sendi al mi 50 subskrib-foliojn, por ke mi povu subteni bonegan aferon".... "Eksciente pri la daŭrigo de la kampanjo, ni prenis decidon transdoni ankoraŭ multajn milojn da individuaj subskriboj kaj organizi ĉe nia societo specialan komitaton por organizado de la kolektado. Pro tio ni ankoraŭfoje petas vin, ke vi sendu al ni 10 000 (dek mil) foliojn por subskriboj"....

Jen la du unuaj reagoj al la anonco, ke la kampanjo por kolekti subskribojn por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj pludaŭros ĝis la fino de julio ĉijara. La rekomenco estas evidente tre kuraĝiga kaj permesas esperi, ke ĝis la lasta limdato estos atingitaj vere imponaj nombroj.

Pro la malnova limdato de la 31-a de decembro venis subita lavango da folioj al la C.O. ĉirkaŭ la jarfino. Ankoraŭ multaj atendas pri-trakton, sed provizora statistikado montras, ke jam alvenis almenaŭ 678 000 individuaj subskriboj el 59 landoj. Krome subskribis 3268 organizaĵoj kun preskaŭ 58 milionoj da membroj. Laŭ la absoluta nombro de individuaj subskriboj, sur la unua loko ankoraŭ ĉiam staras Japanujo, kvankam Bulgarujo tre proksimiĝis. La trian lokon transprenis Jugoslavio. Proporcie al sia loĝantaro, plej bonajn rezultojn atingis Monako (2,07 %) kaj Bulgarujo (1,80 %).

Elstaraj nomoj el la publika vivo

La granda jarfina rikolto de subskriboj kompreneble donis ankaŭ proporcie altan nombron da eminentuloj: tiel multajn, efektive, ke ĉi tie eblas nur plej simple vicigi la nomojn.

Kune kun la ĉefministro de Islando d-ro B. Benediktsson subskribis multaj membroj de la islandaj registaro kaj parlamento, i.a. la ministro de instruado s-ro Gylfi Th. Gíslason kaj tiu de sociaj aferoj s-ro Emil Jónsson. Aliaj ministroj subskribintaj estas R. Mason (Britujo, ŝtatministro pri komerco), Brian J. Talboys (Nov-Zelando, agrikulturo kaj scienco), J. R. Hanan (N-Z, justico kaj maoriaj aferoj), Hans Schütz Germanujo, ŝtatministro), d-ro Bruno Pittermann (Aŭstrujo, vic-kanceliero), kaj la aŭstraj ministroj d-ro Bruno Kreisky (eksteraj aferoj), Anton Proksch (socia administro), Otto Probst (komunikoj, elektro).

Sekvas jenaj eksministroj: Hans Frenzel (Aŭstrujo), Ĥutas Stylianos (Grekujo), s-ro Blank (iama germana federacia ministro), José F. Arias (Urugvajo, nun prezidanto de la ĉambro de deputitoj, eksministro de industrio kaj laboro), prof. d-ro J. J. Gielen (Nederlando, instruado, artoj kaj sciencoj) kaj André Marie (Francujo, iama prezidanto de la ministraro). Plue subskribis s-ro Luis Legaz-Lacambra, hispana subsekretario de nacia edukado; Alfredo Saveedo, vic-sekretario pri kulturaj afe-

roj de la prezidanto de la Meksika Respubliko; d-ro A. Muheim, prezidanto de la registaro de la kantono Luzern, Svislando; Emilio Frugoni, fondinto de la urugvaja socialista partio, iama ambasadoro en Sovetunio; s-ro Altmeier, ĉefministro de Rejnlando-Palatinato, Germanujo; Josef Wallner, vicprezidanto de la nacia konsilantaro (parlamento) aŭstra; kaj en Bulgarujo: d-ro Vl. Kalajĝiev, vicministro pri popola sano; Bistra Avramova, Minĉo Ĉerneŭ kaj Ivan Nenov, vicministroj pri popola klerigo.

Inter akademianoj elstaras: Georges Poivilliers kaj Jean Wyart (Franca Scienca Akademio), Dezsö Pais (Hungarujo), Jozef Mistrik (Slovaka Scienca Akademio). Inter verkistoj: la usona aŭtoro Upton Sinclair kaj la plej elstara ĉeĥa poeto Jaroslav Seifert. Inter universitataj: la prezidanto de la universitato Kyung Hee, Seulo, kaj 26 profesoroj de la universitato en La Laguna, Hispanujo. Inter industriistoj: d-ro inĝ. Attilio Torti, prezidanto de la itala federacio de malgranda kaj mezgranda industrio "Confapi".

Krome notindaj: la centra sekretario de la aŭstra sindikato; la urbestroj i.a. de Nagoya, Oslo, Graz kaj Reykjavík; la episkopo de Eisenstadt, Aŭstrujo.

Precipe sindikatoj apogas

Same kiel da individuoj, ankaŭ tre multe da gravaj organizaĵoj troviĝas inter la laste ricevitaj subskriboj. Ni menciuj la sindikatojn: Preso kaj Papero (Germanujo; 145 000 anoj), poŝtista (Germanujo; 331 000 anoj), publikaj servoj transportaj kaj trafikaj (Germanujo; 983 000 anoj), fervojista (Svislando; 65 000 anoj), medicinista (Bulgarujo; 90 000 anoj), ĝenerala distrikta (Plovdiv, Bulgarujo; 165 000 anoj), kaj ĝenerala kristana (Belgujo; 834 196 anoj). El politikaj organizaĵoj: Popola Partio, Supra Aŭstrujo (200 000), Socialista Unuiĝo de la Laborpopolo de Makedonio (622 000). Sportaj kaj junularaj: Junulara Ligo (1 831 000) kaj Asocio por Korpedukado "Partizan" (180 000), Jugoslavio; Ĝenerala Direktorejo de Sportaj Aktivecoj, Meksiko D.F., kaj Nacia Instituto de la Meksika Junularo (po 160 000). Fine: Asocio de Popoltekniko, Jugoslavio (682 000), Libereklezia Studfederacio, Svedujo (275 000) kaj Ligo de Multnombraj Familioj, Belgujo (290 000 anoj).

Imitinde: novaj rekorduloj

Fratoj-studentoj Georgi kaj Nikolaj Mihajlovi en Sofio kolektis 38 879 individuajn subskribojn! Samlande, Penĉo Petrov atingis 11 490. En Hungarujo: Molnár lászló (7883), Stankó istván (3675) kaj Wágner andrás (1239). En Aŭstrujo: Karl Friedl (2050) kaj frato J. M. Nagy (1005). Kaj en Ĉeĥoslovakujo: Stanislav Čáp jam atingis pli ol 4000!

La revo de ĉiuj studentoj — lerni dormante — eble baldaŭ fariĝos realaĵo.

Jam dum pluraj jaroj, psikologoj kaj edukistoj tra la tuta mondo eksperimentis pri metodoj de dum-dorma instruado. En Britujo, ekzemple, formiĝis nacia Komitato pri Dum-dorma Instruado, kiu celas kunordigi la esplorojn, kaj pluraj firmoj jam ofertas speciale adaptitajn magnetofonojn, kiuj povas funkcii dum la tuta nokto, ripetante ekzemple frazojn en fremda lingvo aŭ informojn pri iu teknika temo.

Laŭsupoze, la "aŭskultataj" vortoj penetras la cerbon eĉ dum la dormo, kaj, kondiĉe ke la instruanta voĉo estas sufiĉe mallaŭta kaj trankvila por ne ĝeni la ripozon de la lernanto, faktoj restas en memoro pli-malpli same, kiel dum ordinara instruado.

Ĝis antaŭ nelonge, tamen, ĉio ĉi restis nura teorio. Malgraŭ ŝajna sukceso de la metodo ĉe multaj individuaj lernantoj — kaj malgraŭ neklarigita malsukceso en aliaj kazoj — la principojn de dum-dorma instruado (aŭ hipnopedio, kiel oni komencas nomi ĝin) oni ankoraŭ neniam sisteme studis.

Fine, en la pasinta oktobro, komenciĝis en la

industria urbo Ustí nad Labem, en norda Bohemujo, sub aŭspicio de la Eduko Servo de Ĉeĥoslovaka Radio, la unua amas-eksperimento pri "hipnopedio".

La eksperimento mem daŭras kvin monatojn. Kiel objekton de la instruado oni elektis la anglan lingvon, kaj kiel rimedon oni utiligas la per-kablan radio-reton de la urbo. Per ĝi la volontuloj, kiuj sin anoncis por lerni dormante, "aŭskultos" dek lecionojn, po unu en du semajnoj.

Ĉiu leciono daŭras 12 horojn: de la 20-a ĝis la 8-a matene. Dum la unuaj tri horoj la lernanto vere aŭskultas — ne dormante. Dum tiuj horoj li aŭdas rapidan kurson pri gramatiko kaj vortaro. Je la 23-a horo lin endormigas agrabla lulkanto, kaj dum la tri sekvantaj horoj la radio flustre ripetas la lecionon en liajn dormantajn orelojn. Je la 2-a matene, voksignalo vekas la "kobajon" por mallonga ripetado. Poste li denove endormiĝas kaj la radio daŭrigas sian flustradon. Je la 5-a matene finiĝas lia dormo kaj li devas atente restudi dum tri horoj antaŭ ol fine atingi sian — sendube merititan — matenmanĝon.

(Unesko-Novaĵoj)

UEA : KOMUNISTA AGENTO DE USONA IMPERIISMO !

citaĵoj

En 1956, en "Amerika Esperantisto" (organo de EANA), oni povis legi:

"Pripensinde tiurilate estas: la kreskanta influo de komunistaj landoj en administrado de UEA; la fakto ke tiuj voĉoj devas voĉdoni laŭ instrukcioj de la kompartioj en iliaj landoj; la stranga fenomeno de multaj voĉoj el Jugoslavujo; la oficiala sendito de UEA kiu samtempe estas sendito de Jugoslavujo por komunista propagando (vidu paĝon 78, *Esperanto*, majo 1956); la pena strebado por akordi kun komunistaj landoj kaj celoj; la pena klopodo por forigi kontraŭkomunistojn kaj kontraŭ-komunistajn E-asociojn. Ĉu ni devas toleri tion?" (majo-junio p. 80).

Kaj nun, fine de 1965, oni povis legi en "Paco" (organo de MEM — japana eldono): "Kia moko al sia nomo, al homa kulturo estas 'Monda Kulturo' eldonata de tiaj fi-bravuloj en tigras feloj(!) en Konsultaj Rilatoj kun UNESKO, amiko de tiu internacia rabistaro, usona imperiismo! Kiel ŝerco al la nomo de nia Zamenhof, kreinto de Esperanto, Monda Kulturo, kiu, interalie, tradukis la faman verkon de Schiller, 'Rabistoj', ne por rabi sed por doni ion al esperantistaro.

Dum la 'Monda Kulturo' kveraras kun imperiistaj reakciuloj, ĝi restos ilo de uneska kulturo, ĝi ne spegulos vere mondan kulturon kiu estas rekonstruata de tiuj viglaj popoloj

tra la mondo kiuj nun ĉiam pli kaj pli avantaĝe luktas kun la agresema novkoloniismo de usona monopolo, la internacia dissemanto de venenaj semoj kontraŭ la homa civilizacio." (novembro, n-ro 144, p. 12).


Kaj tamen temas ĉiam ankoraŭ pri la sama UEA, kun la sama Statuto, laŭ kiu ĝi estas "neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj", rigore observata de ĉiuj instancoj de UEA — kaj ĉiam, same tiel en 1965 kiel en 1956, en konsultaj rilatoj kun Unesko! Unu aferon ni volus konsili al ambaŭ ekstretoj: fondu vian propran komunan organizaĵon kaj tie daŭrigu viajn reciprokajn atakojn kaj insultojn, sed lasu UEA trankvile labori sur la bazo de ĝia laŭstatuta neŭtraleco — kondiĉo de ĝia universaleco kaj garantio de progreso.

"Hispanio por vi": "Vi salutu per mampremo. Kvankam ne tiel ofte kiel la francoj, la hispanoj uzas ĉi tiun saluton preskaŭ ĉiam."

"La suda stelo": "Ni esperantistoj estas tre stangaj homoj." Pro tio la multaj flagoj....

Drs. F. Roose, en "Sonorilo": "Mi ne ŝatas la titolon 'soifo' ĉar ĝi estas unu de tiuj multaj Francaj vortoj kiuj tiel sklave estas adoptitaj en Esp., kaj kiuj malagrablas al la oreloj, despli ĉar ili ne estas internaciaj."

esperanto
februaro 1966



Fiĝia vilaĝo

LA LINGVOJ

Arthur

artikolserio : LA ETNAJ LINGVOJ EN KOMPARO KUN LA INTERNACIA

4: la oceaniaj

Ju pli mi vojaĝas, des pli mi trovas nekonitaĵojn, ofte nekutimajn, ĉiam interesajn. Same en la socia vivo kiel en la lingvo. La parolanto de eŭropa lingvo multfoje ne havas ideon pri la propraj, kiuj ekzistas en la lingvoj ekstereŭropaj.

En tiu ĉi artikolo mi priskribos mallonge lingvojn de tute alia familio, ol la eŭropaj — ĉu hindeŭropaj aŭ ne — kiujn oni parolas en Eŭropo. Mi priskribos la lingvojn de Pacifiko, la oceania regiono.

Geografio kaj loĝantaro

La oceania regiono havas grandegan etendadon. Ĝi etendiĝas ekde Madagaskaro ĝis Paska Insulo, kaj la popoloj parolas lingvojn de unu granda familio, nome la "oceania" aŭ pli teknike "aŭstronezia" — lingvoj de la suda insularo. Esceptoj estas la lingvoj de Aŭstralio kaj de Nov-Gvineo. La lingvoj de Aŭstralio formas familion sendependan, nome "aŭstralia", kiu laŭ ĉio, kion oni ĝis nun scias, ne havas rilaton kun iu ajn alia familio de la mondo. La pliparton de la novgvineaj lingvoj oni ankoraŭ ne estas klasiginta. Estas ĉ. 700 en la granda insulo, kaj sendube, kiam taŭga informo estos disponebla, oni povos aranĝi ilin laŭ pluraj familioj, sed necesos ankoraŭ multa studado kaj plua surloka esplorado por amasigi la sciaĵojn necesajn por la tasko. En Aŭstralio multaj lingvoj estas jam mortintaj, kaj aliaj rapide malaperas, dum la eŭropa kulturo disvastiĝas, sed ekzistas ankoraŭ pluraj centoj da lingvoj, kaj la proceso de lingva studado daŭras.

Ekster ĉi tiuj du grandaj termasoj la loĝantaro de Pacifiko konsistas el grupoj de interparencaj popoloj, pli frue nomitaj Malajo-Polineziaj, sed nuntempe pli ĝenerale Aŭstroneziaj. Ili estas Indonezianoj en la okcidento, inkluzive de Madagaskaro, kies loĝantaro ŝajnas esti elirinta el Indonezio ĉ. la 3-a jarcento de la nuna erao; en la nordo la Mikronezianoj, en la centro la Melanezianoj kaj en la oriento, disvastigitaj kiel arko el Havajo, tra Paska

Insulo kaj Rarotonga ĝis Nov-Zelando, la Polinezianoj. Ĉiuj ĉi popoloj estas venintaj el Suda Azio je malsamaj tempoj kaj per malsamaj vojoj, sendube pro malsamaj kaŭzoj, kaj koloniis la insulgrupojn. Rezulte la lingvoj de ĉi tiu regiono estas interparencaj, kvankam la parolantoj ŝajnas tre malsamaj en la diversaj lokoj.

La pliparto de l' homaro, kiu ne loĝas tie, emas pensi pri Oceanio kiel regiono de ĉiama sunlumo, kie oni ne bezonas labori sed povas kuŝi sub la fruktarboj, ĝis la maturaj fruktoj falas en la buŝon. Kompreneble, tio estas romantikaĵo, kaj la vivo de tiuj popoloj necesigas tiom da laboro, kiel la vivo aliloke.

La lingvoj

La interparenceco de la oceaniaj lingvoj evidentiĝas el la vortprovizo komuna al la diversaj lingvoj. Oni povas trovi vortojn kiel *mata*, 'okulo', *lima*, 'mano', *vano*, 'iri' kaj pluraj centoj da aliaj de unu limo de la regiono ĝis la alia. Aliaj vortoj aperas laŭloke sed ne ĉie, tute same kiel en la hindeŭropaj lingvoj. Ĝenerale la sonoj ne estas malfacilaj por eŭropanoj, kaj la formoj similas al la specimenoj supra donitaj. En indoneziaj lingvoj la vortoj povas finiĝi konsonante, kiel la malaja *takut*, 'timo', aŭ havi konsonantgrupojn kiel la malaja *mentakut*, 'timi', sed pli oriente la vorto estas kutime *mataku*, *mata'u*. La Aŭstronezia gramatiko ne estas kompleksa. Ne aperas diferencoj de genro ('li' kaj 'ŝi' estas sama vorto, pleje *ia*) nek de kazo (en la fiĝia, 'en la domo' estas *e na vale*), kaj la verbaj formoj estas simplaj.

Restas tamen trajto, kiu surprizas parolantojn de eŭropaj lingvoj. Waringhien en sia *Lingvo kaj Vivo* nomas unu ĉapitran sekcion "Lingvaj obstakloj al la internacia kompreniĝado", kaj skribas pri strukturaj problemoj kiel unu speco de obstaklo. Kiel en eŭropaj lingvoj, tiel — aŭ eĉ plie — en oceaniaj lingvoj oni trovas tiajn obstaklojn al la kompreniĝado inter eŭropanoj kaj insulanoj. La strukturo de l' oceaniaj lingvoj estas preskaŭ neniam kompleksa, kiel supre montrite, sed ili diferencigas disde la eŭropaj lingvoj. Ekzemple, en eŭropaj lingvoj oni diras 'ni', kio enhavas la ideon 'mi kaj miaj aŭdantoj', aŭ 'mi kaj la homoj, pri kiuj mi parolas', aŭ 'mi kaj vi kaj ili'. En aŭstroneziaj lingvoj estas malsame. En la fiĝia lingvo, se oni diras *au na lako*, tio signifas 'mi iros', sed por 'ni iros' ekzistas 6 frazoj:

1. *enda na lako*, mi kaj vi, ni ĉiuj, iros.
2. *keimami na lako*, ni aliaj iros, sed vi ne.
3. *endaru na lako*, mi kaj ci (2 homoj) iros.
4. *kendrau na lako*, mi kaj li iros (sed ci ne).
5. *endatou na lako*, mi kaj vi du iros.


DE OCEANIO

Capell

6. *keitou na lako*, mi kaj ili du iros (sed ci ne). Tiel ekzistas ses malsamaj vortoj por 'ni', ĉiuj havantaj rigide difinitajn uzojn.

Plue, rilate la posedon de aĵoj, la aŭstroneziaj lingvoj estas multe pli ekzaktoj, ol la niaj. Fiĝilingve, la juna kokoso, taŭga por trinki, estas *mbu*. Se mi diras *na nonggu mbu*, 'mia kokoso', tio signifas nur, ke mi havas ĝin (uzo ne dirita), sed se mi diras *na menggu mbu*, tio signifas 'mia trinkaĵo la kokoso'; se mi diras *na nggau mbu*, signifas 'mia kokoso, kies nutraĵon mi kuiras kaj mangos'. Aliaj lingvoj estas ankoraŭ pli kompleksaj rilate la manieron de posedo, kaj diferencigas ankoraŭ plie la specojn de posedo laŭ la uzo aŭ la naturo de l' objekto. Polineziaj lingvoj diferencigas la posedon rilate al la objekto, ekz. en la maoria de Nov-Zelando: *t-aa-ku*, 'la-de-mi', 'mia', se oni ne havas tutan superregon de l' objekto, kaj *t-oo-ku*, se oni ja havas superregon. Tial, *taaku tahu*, 'mia edzo', dirus la edzino en tiu ĉi patriarka socio, kaj *tooku wahine*, 'mia edzino', dirus la edzo. Ankaŭ *tooku kaakahu*, 'miaj vestaĵoj'.

Tiel la tuta rigardmaniero pri la ĉiutaga agado estas malsama ol la eŭropa. Tio aperas klare el la verbsistemoj de ĉi tiuj lingvoj. Ne ekzistas ĝenerale pasiva verbo: anstataŭ 'la domo estis konstruita' oni dirus 'ili konstruis la domon'. Sed per prefiksoj oni povas esprimi la



kaŭzon de l' ago: fiĝie, *vaka-mate-a*, 'kaŭzi, ke li mortu', 'mortigi lin', kaj *vaka-* tiel esprimas la kaŭzativon. Sammaniere la reciproka ago: *vei-mate-i*, 'mortigi unu la alian', kie *vei-* estas la prefikso. Estas ankaŭ sistemo de sufiksoj por indiki la transitivecon: *dhambe* (*dh* kiel angla *th* en *then*), 'grimpi': *dhambe-ta na kau*, 'grimpi sur la arbo', kaj *dhambe-taka na matau*, 'grimpi kun la hakilo'. La sistemo estas kompleksa, kaj la formoj ne ĉiam antaŭdireblaj.

Oni ankoraŭ ne scias la veran historion de ĉi tiuj lingvoj, nur oni kredas, ke ili disvastiĝis el sudorienta Azio, sed estas ankoraŭ tro da kontraŭdiroj por ekzameni la problemon en tiu ĉi artikolo. La lingvoj estas multegaj, kaj multaj el ili eĉ ĝis nun ne bone konataj.

La aŭtoro, lektoro pri oceaniaj lingvoj en la universitato de Sydney

Milita gesto-danco de maorioj en tradiciaj kostumoj, Rotorua, Nov-Zelando





Ferenc Lajos en sia laborĉambro

Sándor Szathmári :

La trilogio de Dante inspiris jam multegajn grafikistojn kaj pentristojn. Por mencii nur la plej konatajn: *Botticelli, Michelangelo, Frederico Zuccari, Giovanni Stradano, Francesco Scaramuzza, Gustav Doré, John Flaxmann*. Dum la lastaj tempoj: *Renato Guttuso* kaj *Salvador Dalí*.

Memkompreneble la Dia Komedio forte inspiris ankaŭ hungarajn artistojn, inter kiuj estas menciindaj *Károly Markó, Sándor Ipoly, Aladár Fáy* kaj *Ferenc Lajos*. Inter ili la plej interesa hungara ilustristo de Dante, kiu plej profunde travivis kaj per sia tute individua talento malfermis la misterojn de la Dia Komedio, estas sendube Ferenc Lajos. Lia abunda, preskaŭ transmonda fantazio estas io tute alia, ol la ĝisnunaj pli-malpli konvenciaj reproduktantaj ilustraĵoj.

La stilo de Ferenc Lajos estas rakontanta, vizia, iome romantika, sed super ĉio ĉi havas iaspecan nekutimitan, specialan stil-aromon. Tio estas lia orientema artmaniero, kiu, miksite kun la okcidenta temo kaj lia okcidentstila objektiveco, tamen en kompleta harmonio, donas ian ravan, ekstreme viglan interpretkapablon al liaj ilustraĵoj. Kaj tiu harmonio estas tute komprenebla: Dia Komedio entenas ambaŭ elementojn: la orientan, instinktecan mistikismon kaj okcidentan logikemon. Ĝis nun Ferenc Lajos estas la ilustristo, en kiu ambaŭ kapabloj feliĉmaniere renkontiĝas. Ni observu eble la ornamajn arbotrunkojn en la proksima plano de la purgatoria bildo kaj la ondantajn, preskaŭ nur dekorformajn liniojn de la kaleŝo. Tamen, la tuto de la bildo estas intelekteme rakontanta la okazintaĵon. Ambaŭ stil-elementoj bonharmonie apogas unu la alian.


Al ĉi tiuj stilmanieroj aldoniĝas lia preskaŭ senlima fantazio, kiu bunte flugilas sur ĉiu lia bildo.

Li pretigis sume 72 ilustraĵojn al la Dia Komedio, kiujn aĉetis ne nur pluraj italaj Dante-societoj, sed ankaŭ Unesko mem, okaze de la Dante-jaro. Dante estas memkompreneble nur unu el liaj temoj. Li faris multajn ilustraĵojn kaj individuajn kreaĵojn. Lia laborejo estas plena per grafikaj kaj pentraj produktaĵoj. El tiuj, por gustumo, ni vidu du diverstendencajn, sed, nature, samkarakterajn bildojn.

(daŭrigo sur p. 30)


LA GRAFIKARTO DE FERENC LAJOS

En la tera Paradizo la parada kaleŝo returniĝas. Fone la pomarbo de la scio. (Purgatorio XXXII)



"LA PLEJ VASTA FANTAZI-REGNO ..."

Fabelkasteloj



La pordego de Oriento

"La pordego de Oriento" per sia ŝaktabulsi-mila antaŭplano, kiun fermas la monumenteca, azia-stila ligna pordego, impresas kiel mistika uverturo de la senfina, eĉ pli mistika fono kun la malaperanta vojo, neĝpintaj montoj kaj malhele minacbrila ĉielo.

Due, en la timindaj rokturoj de "Fabelkasteloj" ni povas denove sperti la neelĉerpeblan fantazon de Ferenc Lajos. La morna, senviva pejzaĝo, zigzagaj ŝtonpadoj, la bizara rok-konzolo estas pli ol sonĝa vizio, plena de embuskantaj danĝeroj, ĉu en la senfundaj abismoj, ĉu malantaŭ la manplatgrandaj, malice gvatantaj fenestretoj de la pintkasteloj.

Ferenc Lajos naskiĝis en 1912. La artan altlernejon li vizitis Budapeŝte, poste faris studvojaĝojn en Vieno, Berlino, Parizo, Leipzig, Riga, Helsinko. Unua lia ekspozicio okazis en 1931. Liaj kolektitaj grafikaĵoj, pentraĵoj aperis ne nur en Hungarujo, sed ankaŭ — kaj plejparte, — eksterlande. Aparte bela albumo aperis sub la titolo "Fata morgana" en Verona, en 1959, kun 72 grandaj bildkartonoj el liaj plej karakterizaj kreaĵoj. Li estas eble pli konata eksterlande ol hejme. Tio estas komprenebla, ĉar li pretigis ilustraĵojn precipe por eksterlandaj eldonaĵoj, plejparte por fantaziaj rakontoj, kiel ekz. "The first men in the Moon" (La unuaj homoj en la Luno) de H. G. Wells, al iu imagita historio de Atlantis, ktp.

Nepre ni devas konstati, ke Ferenc Lajos havas la plej vastan fantazi-regnon kaj la plej trafenetran esprimkapablon inter la lasttempaj hungaraj grafikistoj. Ĉiu lia bildo donas revelacian travivaĵon.

La aŭtoro, konata per siaj poemtradukoj
el la ĉeĥa, ĉi tie debutas proze.

Eduard Felix

La spektantoj ekkriegis, parte ĝoje, parte malkontente, laŭ tio, je kiu duelanto ili vetis sian monon.

Nur unu homo inter ili, kiu estis rigardinta la lukton kviete, sed tre intense per siaj penetraj bluaj okuloj el sub hirtaj, blondaj brovoj, ne kriis. Meze de la brua tumulto li ekstaris, kaj superante ĉiujn ceterajn je bona kapo, li iris for. Nur la plej proksimaj ekaŭdis kontentan flustron el sub lia rusteta riĉa barbo:

"Jen nova klara atesto pri mia teorio: la lukto forigis la pli malfortan kaj per ĝi la Naturo selektis la pli taŭgan, kiu nun plu-vivos en sia gento."

En Mezapi sur la insulo Sumatro, antaŭ mal-granda gastejo, amaseto da homoj kaŭre sidas, streĉite rigardante du etajn belegajn fiŝetojn, kiuj, ĉiu en propra vitra vazo, paradas per siaj flirtantaj, irizkoloraj naĝiloj.

Dum tiu sepvuala danco, plena de amo kaj spito kaj pranco, kio en ili ja subite speguligas intermite plenan paletron de koloroj de la sumatraj floroj, lazuron de aŭro en matena horo, sunsubiron, ruĝan kiel flamo, ĉiujn bluojn de la Hinda oceano?

En tria vitra vazo supren kaj malsupren modesta ino naĝas sen emfazo.

La posedanto de la entrepreno, sinjoro N'Gwan, sperta vetestro, notas en malpuran, foruzitan libron la vetsumojn.

Fine, rien ne va plus ! *

Per ceremonia movo li verŝas la enhavon de la du vazoj en unu vitran kuveton kun glataj, ebenaj vandoj. (Oni devas satigi la vid-avidon de la klientoj!) Kiam la akvo senmoviĝis, dum kelke da momentoj la du konkurantoj daŭrigas sian kolor-baleton, pli kaj pli riĉigas ĝian paletron,

sed subite, kvazaŭ elpafite per sama risorto al sama sorto, ili karambolas. La akvo ĉirkaŭ ili bolas, ili mordas unu la alian, la multkoloraj vualoj flagras lastan fojon, poste disŝirite drivas en la akvo kvazaŭ palaj ĉifonoj. La akvo kaj la okuloj de la spektantoj ruĝiĝas de sango, per ŝaŭmanta buŝo oni kriaĉas por eksciti sian favoraton (kion li kompreneble ne aŭdas), sed ambaŭ batalantoj mem estas ekscititaj ĝis sen-konscio, ili tiras kaj ŝiras kaj taŭzas kaj naŭzas. Post minuto la du feaj, belegaj estaĵetoj, plenaj de vivo kaj poezio, ŝanĝiĝis en paron da krip-luloj, el kiuj finfine unu eldrivas surfacen, kun la ventro supren, kaj la dua ne fartas multe pli bone.

Estas domaĝe, ke Mr Darwin sur sia fami-ĝonta ĉirkaŭgloba vojaĝo ne restis ankoraŭ du semajnojn en Mezapi.

Unue li estus eksciinta, ke li erare aŭguris: la venkinta luktofiŝo mortis jam venonttage pro siaj vundoj kaj la flegman inon fekundigis alia, freŝa vireto, tute senlukte.

Kaj due li fariĝus atestanto de unu el la plej spritaj inventoj, kiujn elpensis la homa cerbo, kvankam bedaŭrinde ankoraŭ nun, post cent jaroj, oni ĝin plene ne konceptis kaj por la homaro ne utiligis.

(fino sur sekvanta paĝo)

esperanto
februaro 1966

Esperanto: A new Approach (laŭ nova metodo), de William Auld. Eld. Heroldo, Bruselo, 1965. 92 p. 19 x 13 cm. Lernolibro por anglalingvanoj. Kvanto: 2000 ekz. 4,50 gld. (18 st.)*

En la antaŭparolo, Auld sciigas sian intencon: instrui la kapablon *legi Esperanton*. Li celas la izolitan studenton, kiu lernas sen klasoj kaj sen instruisto. 14 lecionoj (sume, 60 p.) prezentas la lingvon: la ĉefajn gramatikajn regulojn, 730 radikojn, kaj tradukekzercojn. Sekvas ŝlosilo por la ekzercoj, mallonga vortaro esperanto-angla, utila informo pri vortaroj, studlibroj, gazetoj, kaj naciaj asocioj, kaj laste indekso.

Kio estas nova en la libro? La simpleco kaj klareco de gramatikaj eksplikoj; rezigno "simpligi" la lingvon per arbitra elekto de "tuj rekoneblaj" radikoj aŭ facila sed nenatura verkstilo; matura kaj objektiva prezento; kompreno ke *nenio* estas tiel simpla, ke ĝi ne bezonas eksplikon; utiligo de poemoj kaj literaturekstraktoj elektitaj pro ilia literatura valoro.

Kio estas malnova en la libro? La instruometodo. Auld prezentas gramatika(j)n regulo(j)n, kun kelkaj ekzemploj; sekvas tradukekzerco esperanto-angla; poste, pli da reguloj, kaj nova tradukekzerco. Kritike estas, ke en pluraj (ne ĉiuj) tradukekzercoj, la frazoj ne estas interligitaj.

Bona papero, klara preso, zorga preslego bone impresas. Nur unu preseraro ĝenos studentojn: sur p. 14, *sajnas* anstataŭ *ŝajnas* pro-

bable perdigos multan tempon por la zorge studanta lernanto.

Restas la tasko diskuti la utilecon de la libro. Mia konvinkigo restas neŝanĝita, ke la libro de Butler, *Step by Step in Esperanto*, ankoraŭ estas la plej uzinda lernolibro esperanta por anglalingvanoj. Sed estas vere, ke ĝia amplekso kaj ĝia neortodoksa instrumentado fortimigas multajn potencialajn lernantojn. La kvalito de la verko de Auld estas certe egala al tiu de Butler, sed la amplekso kaj la karaktero de instruado logas multe pli. Konsekvence danĝero estas, ke la lernanto ĉesos lerni post la 14 lecionoj, kaj restos inter la "eternaj komencantoj." Tiu danĝero estas tre reala, kiam ajn oni uzas malgrandan lernolibron. Sed aparte de tiu averto, mi varme rekomendas ĉi tiun verkon.

Donald Broadribb (Melbourne)

Sub la ĉielo: Serio "Legu kaj lernu" n-ro 4. Eld. Faux, Britujo, 1965. 24 p. 17 x 11 cm., mult., il. 0,75 gld. (3 st.)*

La libreto enhavas legaĵojn, ludojn kaj kantojn kun muziknotoj el la plej diversaj partoj de la mondo. Ni portu ĉi tiun libreton okaze de tendumo, de promenado, de vagado. Trafaj ilustraĵoj ornamas la libreton. La konata aŭtoro meritas nian dankegon.

Andor Gauder (Hungarujo)

"RETORIKO" ELĈERPITA

La Libroservo de UEA informas, ke la dua eldono de "Retoriko" estas nun elĉerpita.

Jānis Rainis, latva popola poeto. Eld. Moskvo 1965. 30 p. 21 x 14 cm., ofsetita. 1,50 gld.*

Aperinta okaze de la 100-jara datreveno de la poeto, la libreto konsistas el enkonduka artikolo pri la vivo kaj verko de Rainis, el la plumo de M. Burgmeister, 14 lirikaj poemoj, 1 akto el la dramo "Ora ĉevalo" kaj 16 aforismoj, en la tradukoj de E. Lippe, M. Jakubcová, K. Gusev, N. Kurzens kaj M. Burgmeister, kaj, fine, 5 eldiroj pri Rainis, tradukitaj de Ed. Jaunvalks. La fidelecon al la originaloj prijuĝu la latvaj esperantistoj; la poezia potenco de la tradukoj varias de poemo al poemo, de tradukinto al tradukinto: la penso de la poeto forestas malpli ofte ol la araneaĵo de liaj sentoj, sed el la Esperantaj versoj ne radias tiuj lumo kaj varmo kiujn mi trovis en la rusaj adaptaj de Valerij Brjusov kaj Anna Aĥmatova, ambaŭ grandaj poetoj. Por Rainis, "aforismo estas fulmo, kiu ĉion rapide heligas". Jen, tiu ĉi, eble, heligos lian vivon kaj verkon: "La suno varmigas la lunon, sed la luno ne varmigas la sunon. Estu kiel la suno!" Mi finos per la jenaj vortoj de Maksim Gorkij: "Ne ekzistas tia malgranda nacio, kiu ne estus kapabla doni grandajn majstrojn de literaturo. La latvoj kreis la poeton Rainis".

Petar Stefanović (Jugoslavio)

* *Mendu ĉe UEA*

beta splendens (fino)

Nome sinjoro N'Gwan, la organizanto de la fiŝluktoj, konstatis, ke la bredelspezoj de unuaranga vireto Beta Splendens** jam longe ne respondas al la malriĉa profito el la vetoj. Do, li faris tiun inventon. Simple en la kuveton inter la du rivalojn li metis vitran tabulon.

La kolorludo kaj la militdanco restis same belegaj, kiel antaŭe. Denove ili speguligas plenan paletaron de koloroj de la sumatraj floroj, lazuron de aŭroro en matena horo, sunsubiron, ruĝan kiel flamo, ĉiujn bluojn de la Hinda oceano.

Do, la koloroj kaj la danco decidu, kiu estas la venkinto.

Laŭpoente.

Estas vere, ke kelke da sadistoj, kiuj tien venadis ĝuste por vidi, kiel la belo rapide disfalas al sangantaj ĉifonoj de vualoj kaj de karno, ne plu venis.

Nu, adiaŭ!

Kaj neniam ĝis revido!

* Rien ne va plus: — fino de vetado, ĉefe ĉe hazardaj vetludoj.

** Beta Splendens: — malaja luktofiŝo

Tiel li vivis, de Tran dinh van. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1965. 105 p. 19 x 13 cm., il.*

Resumo: Verkita laŭ la rakonto de la vidvino de Ngujen van troi, la libro prezentas ŝiajn spertojn de 10.5.1964, kiam li provis mortigi la usonan ministron pri defendo Robert S. McNamara, ĝis 15.10.1964, kiam okazis lia pafekzekuto en Sajgono.

Monoteismo kaj pozitiva moralo, de Emilo Gasse. Eld. la aŭtoro, 1965. 59 p. 19 x 13 cm. 4,40 gld. (17,6 st.)*

Resumo: Kritikon pri diversaj aspektoj de religioj, ĉefe la kristana, sekvas la principoj de "Pozitiva Moralo", kun tre diversfontaj citaĵoj kaj aldono de la Universala Deklarado pri Homaj Rajtoj.

resumoj
ricevitaj eldonaĵoj
nekrologoj
leteroj

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Historieca studo pri la evoluo de Esperanta literaturo, de Hengwi Hong. 14 p. 26 x 19 cm. Korelingva studo.

Esperanto, de Hengwi Hong (?). 36 p. 26 x 19 cm. Korelingva broŝuro.

Uĉebnica Esperanta, de František Šatura kaj Pavel Rosa. Slovaka Pedagogia Eldonejo, Bratislava, 1965. 219 + 23 p., 20 x 15 cm., il. 6100 ekz. Lernolibro por slovakoj. 3,50 gld.*

[Broŝuro sen titolo]. Eld. Fondaĵo Anne Frank, Amsterdam, 1965. 36 p. 13 x 21 cm., il. 2,— gld.* Pri Anne Frank kaj la laboro de la Fondaĵo A.F.

Esperantaj poŝtstampoj: provkatalogo. Eld. Pola E-Asocio, Varsovio 1965. 48 p. 20 x 15 cm., multobl. 1,30 gld.*

La ebria muso, de Irena Jabłońska. Eld. Pola E-Junularo, Vroclavo 1965. 35 p. 17 x 12 cm., il. 5250 ekz. Ses fabeloj por infanoj.

Vojaĝo en Esperantujo, de Kiotaro Deguti. Eld. Asahi Shinbun, Tokio, 1965. 190 p. 18 x 12 cm., il. 50 000 ekz. En japana lingvo.

Bonvenon al Nikko Nacia Parko. Eld. Turista Fakto de Toĉigi-gubernia Oficejo, Ugunomiya, Japanujo. Kolora senpaga faldfolio.

Lernolibro de Esperanto, de Heng Wi Hong. Eld. Korea Esperanto-Instituto, Taegu, 1963. Dua eldono. 158 p. 21 x 15 cm. Por koreoj.*

Esperanto-Korea Vortareto, de H. W. Hong. Eld. Korea E-Instituto, Taegu, 1963. 70 p. 21 x 15 cm. (Represaĵo el "Lernolibro de Esperanto").*

Certe triumfos la popolo de Vjetnamio! Dua kajero, eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 72 p. 26 x 23 cm. Fotolibro. 0,75 gld.*

Zamenhof, la patro de Esperanto, de Ito' saburo. Eld. Tokio, 1965. Dua eldono. 236 p. 17 x 10 cm., il. Japanlingva biografio.

Kemiaj afiksoj, de Jan Pióro. Eld. la aŭtoro, Varsovio, 1966. 3-a eld., multobligita. 70 p. 21 x 15 cm.

Kalendaro 1966. Eld. Ĉina E-Ligo, Pekino. 12 p. 37 x 26 cm., kun kolorfotoj.

Kalendaro 1966. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 12 p. 38 x 33 cm., kun pentraĵoj.

Maskerado ĉirkaŭ la morto, de Teodoro S. Svarc. Eld. Stafeto, La Laguna, 1965. 247 p. 22 x 16 cm. 10,65 gld. (42,60 st.)*

La svisa trafikmuzeo en Lucerno. Eld. Verkehrshaus der Schweiz, Lidostrasse 5, 6000 Luzern, Svislando. Senpaga faldfolio 12-lingva, ink. E.

Moderne Menschen sprechen.... Esperanto. (Modernaj homoj parolas.... E-on). Eld. GEA, Nürnberg, 1965. Dua, plibonigita eldono de germanlingva informbroŝuro. 38 p. 21 x 15 cm., il. Prezo en Germanujo: 1,— g.m.

INTERNACIA ĤORO ?

Kun granda intereso mi legis la leteron en "Esperanto" por decembro 1965. Dum la 17-a Internacia Fervojista Kongreso en Hamar, Norvegujo, en majo 1965, partoprenis du ĥoroj. Neniu el la gekantistoj, escepte de mi mem, estas esperantisto.

Certe estas nerealigeble, pro manko de komuna ekzercado, starigi internacian ĥoron. Anstataŭe oni povas, kiel dum la IFEF-kongreso, instigi al ĥoroj neesperantistaj kanti en Esperanto.

Per Johan Krogstie
Løten, Norvegujo, 14 dec. 65

Mi estas tre interesita pri la sugesto de s-ro Najbaro. Mi havis la saman ideon antaŭ jaro, kaj por fari eksperimenton mi lastmomente starigis ĥoron dum la pasinta Brita Kongreso. Mi ĉeestos en Budapeŝto por la 51-a Universala Kongreso, kaj mi jam decidis demandi dum la Kongreso, ĉu mi rajtas kunigi internacian ĥoron por la 52-a.

Maŭrico Bale
Windsor, Britujo, 28 dec 65

NEKROLOGOJ



MARCEL ROOST

Mortis en Antverpeno d-ro Marcel Roost, advokatestro, profesoro en la Libera Universitato de Bruselo. Kvankam grave vundita en la Unua Monda Milito, kaj poste parta invalido, li atingis grandan eminentecon en sia fako. La registaroj belga, brita kaj franca distingis lin per ordenoj. Membro de UEA jam de 1935, li dufoje prelegis en ISU kaj estis ties rektoro en 1960.

OTTO SANDROCK

S-ro Otto Sandrock mortis la 8-an de decembro 1965, 80-jara, en Essen, Germanujo. Li lernis Esperanton jam 17-jara kaj estis delonga membro de UEA.

esperanto
februaro 1966



**51-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO
Budapest, 30.VII - 6.VIII.1966**

Sub la Alta Protektado de S-ro Ödön Kishazi,
Vicprezidanto de la Hungara Popola Respubliko
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2 Rotterdam, la 10an de jan.1966

Enirvizo


Klarigoj pri la formalajoj koncernantaj la akiron de vizo por Hungarujo troviĝas en la pasintaj decembra numero de "Praktiko" kaj januara numero de "Esperanto". Bonvolu atenti, ke eventuala antaŭpagita sumo estos redonita en la valuto de la paginto, nur se tiu informos pri nuligo de mendoj antaŭ ol ricevi la hungaran vizon. Post ricevo de la vizo — ĉiukaze antaŭ la 25-a de junio (vidu pri tio la Duan Bultenon) — la eventualan antaŭpagitan monon la paginto povos uzi nur en Hungarujo. Ĉiuj pliaj detaloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Oratora Konkurso

La temoj de la ĉijara Orat. Konkurso estas jenaj:

- Estas vere malfacilege priskribi la eterne senŝanĝan homecon (Lusin);
- Arto ne konas limojn;
- Arto - ĉu memsufiĉa aŭ tendenca?

Budapest: la fiŝista bastiono



- Internacieco de humuro;
- La rolo de Unesko por la reciproka kompreniĝo kaj amikeco inter la gejunuloj de ĉiuj kontinentoj.

Loĝiga Servo

La Loĝiga Servo ne prizorgos loĝejon por grupoj aŭ karavanoj. La partoprenantoj de karavanoj devas individue rezervi loĝejon en Budapeŝt pere de la koncerna mendilo trovebla en la ricevota Dua Bulteno.

Karavano

Anoncis karavanon I.E.F., ĉe S-ro G. Grattapaglia, Via Pallanza 32, Torino, Italujo.

Statistiko (ĝis 10.1.1966)

Arg. 2, Aŭstral. 2, Aŭstrujo 20, Belg. 18, Braz. 2, Brit. 79, Bulg. 37, Ĉeĥ. 27, Dan. 26, Finn. 14, Franc. 198, Germ. 90, Grek. 2, Hisp. 8, Honkongo 1, Hung. 285, Isl. 2, Isr. 7, Ital. 42, Jap. 11, Jug. 15, Meks. 1, Monako 3, Ned. 94, Norv. 5, NZ 1, Pol. 37, Rum. 9, Sov. 6, Sved. 58, Svis. 15, UAR 1, Urug. 1, Usono. 17. Entute 1136 el 34 landoj. (Pasintjare 1069 el 42 landoj).

Kotizalpago

Laŭ la Kongresa Regularo aliĝoj al U.K. estas akceptataj ĝis la 30-a de junio 1966. Personoj, kiuj deziras aliĝi post tiu dato devas alpagi al la fiksita kotizo la sumon de 25.— ned. gld. aŭ egalvaloro, por kompensi la ekstrajn kostojn, kiujn prokrastita aliĝo kaŭzas.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

EKZAMENO EN BUDAPEST

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos en Budapeŝt antaŭ la UK. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu persono, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi, kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo), al la sekretariino de I.E.K.: esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas du usonaj dolaroj (7,20 gld) aŭ ekvivalento, kaj devas esti pagita samtempe. Kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, konsultu la sekretariinon, kiu konsideros la eblecon de speciala aranĝo.

Akceptitaj kandidatoj ricevos specimenajn demandarojn kaj pli detalajn informojn.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Sekretariino: F-ino Marjorie Boulton, 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo. Informpetantoj bonvolu sendi int. respond-kuponon.

LAŬFAKE

Instruado

● Jam du lernejoj, kiuj instruas Esperanton, utiligas lingvo-laboratorion por tiu celo. Unu estas en Britujo, la alia en Aŭstralio. (Pri lingvo-laboratorioj vd. julio 1964).

Kooperativismo

● La Centra Konsilantaro de Kooperativoj en Praha, Ĉeĥoslovakio, eldonos sian monatan senpagan bultenon "Kooperativaj Novaĵoj" ankaŭ en Esperanto, se ĝi ricevos sufiĉe da petoj pri tio. Adreso: Těšnov 5, Praha 1.

Religio

● Bahaistan E-organizaĵon celas starigi d-ro Adelbert Mühlischlegel, Thimiggasse 12, Wien XVIII, Aŭstrujo.

● La turisma organizaĵo "La Naturamikoj", kiu jam subskribis la Proponon al U.N., ĵus decidis pri nova statuto, en kiu aperas la principo "Progresigo kaj apogo de la strebado al internacia lingvo, ekz. Esperanto".

LAŬLANDE

Britujo

● La unuajn sukcesojn en la nova ŝtata dua-grada ekzameno pri Esperanto atingis la lernejo Thomas Bennett en Crawley.

Bulgarujo

● La 18-an de novembro 60-jariĝis prof. ing. Vasil Peevski, prezidanto de la Asocio de Scienco-teknikaj Societoj en Bulgarujo kaj de Esperanto-sekcio ĉe la Bulgara Asocio de Sciencistoj. La ministerio de popola klerigo organizis jubileon.

● 75-jaraĝon kaj 60-jaran esperantistecon festis en Sofio akademiano Ivan H. Krestanov.

Ĉeĥoslovakio

● Landa konferenco okazis en Olomouc en decembro. Ĉeestis 130 delegitoj de E-rondetoj, kaj reprezentantoj de la Ministrejo de Lernejoj kaj Kulturo kaj de Ĉeĥoslovaka E-Komitato.

Germanujo

● En Saksujo, laŭ korespondanto, "novaj grupoj kaj kursoj ekkreskas kiel fungoj": 7 kursoj en Dresden, 5 en Karl-Marx-Stadt kaj grupoj kaj kursoj en multaj aliaj urboj.

Hindujo

● Post la U.K. en Tokio, komitatano C. E. Peterson el Usono vizitis kun sia edzino plurajn orientajn landojn, i.a. ankaŭ Hindujon. Pri la movado en Delhio li raportis jene al la C.O.: "Mi ricevis plej bonan impreson pri la 6-jara tiea laboro de s-ino Haudebine. En Delhio ni renkontis malgrandan, sed tre viglan Esperanto-grupon. Plej rimarkinde estas, ke la tuta grupo flue, eĉ fluege parolas la lingvon.

S-ro Prakash (la peranto de UEA) estas tre agema. Tiu malgranda, sed bonega movado meritas ĉian helpon." Simile entuziasman raporteton pri la tiea movado la C.O. ricevis de alia usona paro, ges. Murray. Evidente S-ino Haudebine sukcesis bone solidigi la rezultojn de sia laboro antaŭ sia forveturo el Hindujo al Japanujo kaj ankoraŭfoje ŝi estas varme gratulinda pro tio. Sed la hinda movado estas ege malriĉa. Financan helpon por ĝi oni povas ĉiam sendi al la C.O. de UEA. Objektojn, librojn, gazetojn aŭ aliajn esperantaĵojn oni sendu al Hinda Esperanto-Instituto, S-ro Seoti Prakash, sekr., P.O.B. 604, New Delhi.

Hispanujo

● Fine de novembro prelegis el la katedro de Esperanto en La Laguna la honora prezidanto de UEA, s-ro Ernfrid Malmgren. La ĵurnalo "El Dia" raportis per foto kaj granda (kvinkolumna) artikolo. (foto)

Irako

● En "Baghdad News" aperis 3-kolumna intervjuo pri Esperanto kun ges-roj C. Murray, kiuj travojaĝas Azion inter la 50-a kaj 51-a Universalaj Kongresoj.

Japanujo

● Post sia sesjara laboro en Hindujo kiel senditino de UEA, s-ino M. Haudebine nun daŭrigas la instruadon de Esperanto en Japanujo. En decembro ŝi instruis en Kioto.

● En 1963 du senditoj de la Oomoto-movado, s-roj K. Deguĉi kaj J. Umeda, ĉirkaŭvojaĝis la mondon per helpo de Esperanto. Japanlingvan priskribon pri tiu vojaĝo verkis s-ro Deguĉi kaj eldonis, tuj antaŭ la 50-a UK, "Asahi Shinbun", unu el la plej konataj ĵurnaloj de Japanujo. Ĝis la fino de oktobro jam disvendiĝis 45 000 ekz., kaj en novembro la eldonnombro kreskis ĝis 50 000.

Malto

● La konkurso de Malta E-Societo (vidu junio 1965, p. 114) donis jenan rezulton: 1. s-ro Ota Ginz (Israelo); 2. s-ro Abonyi árpád (Hungarujo); 3. s-ro Leander Tell (Svedujo).

● D-ro George Zammit, konata poeto en la malta lingvo, fariĝis honora prezidanto de la juna Malta Esperanto-Societo.

Nederlando

● En septembro okazis la unua ŝtata ekzameno por instruistoj de Esperanto. Sukcesis 10 el 23 kandidatoj.

Usono

● En la Ĉambro de Reprezentantoj s-ro Roman C. Pucinski el Illinois anoncis sian intencon proponi rezolucion, kiu "instigus Usonon gvidi la enkondukon de Esperanto kiel neŭtrala lingvo por diplomaciaj rilatoj".

mallongaj novaĵoj



Ernfrid Malmgren
en Hispanujo



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

"AMIKARO"

Tiel nomiĝas skolta tendaro en Britujo, kiu okazos de 21 ĝis 28 julio 1966 en Packington Park, Meriden, Warwickshire. Kunvenos skoltaj 14-18 jaraĵoj el ĉiuj landoj. El unuopaj aliĝintoj oni formas patrolojn internaciajn.

La kotizo estas £ 1,- (40 steloj) por administrado. Kuirilojn kaj tendojn (po unu por patrolo) oni kunprenu. Ĉe la tendejo oni povas aĉeti ĉiajn provizojn, bani, naĝi kaj ŝipveturi. Programo: ludoj, ekskursoj, tendarfajroj, konkursoj, ktp. Oni povas partopreni en posta ekskurso tritaga.

Kiel jam indikas la nomo "Amikaro", la organizantoj (Warwickshire Boy Scouts) volonte bonvenigos esperantistojn; eĉ eblus starigi Esperanto-tendaron aŭ E-patrolon. La brita sekcio de Skolta Esp.-Ligo (SEL) volonte estos peranto por via Esp.-korespondo, kaj ankaŭ alimaniere pretas helpi, ekz. en la havigo de tendoj kaj ilaro. La brita reprezentanto de SEL estas: s-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

Estas aparta tendejo por skoltestroj, kiuj kunvenigas la edzinon. (inf.: SEL)

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO regule sin anoncas, kaj tio estas ĝojiga sperto. La kasisto atentigas, ke krom la patronoj A kaj B (16, resp. 5 gld. jare), ankaŭ jam ekzistas dumvivaj patronoj A kaj B. Ili pagis la dudekoblon, do 320 resp. 100 gld., kaj tiel tutvive apogas TEJO.

Memorige: patrono A ricevas "Kontakto"-n kaj alian materialon pri TEJO. Patrono B ricevas laŭpete materialon pri TEJO.

JUS APERIS:

Dosiero pri NEJOj, eldono de la NEJO-komisiono de TEJO. Ĝi ampleksas 22 stencilitajn paĝojn, kiuj sisteme donas ĉiujn detalojn pri la ĝisnunaj kontaktoj inter tiuj NEJOj kaj TEJO. Ĉiu, kiu okupiĝas pri disvastigo de Esperanto inter ne-esperantistaj organizoj sur junulara kaj eduka terenoj, trovas en la dosiero kompletajn informojn pri la spertoj de TEJO. Prezo: 1,50 gld. (6 steloj), inkl. afrankon. Mendo rekte ĉe: NEJO-komisiono, Kastelenstr. 231, Amsterdam-Z., Ned. Pĉkk. 298924, nome de H. Bakker.

SAMJUSE APERIS:

Dua oficiala informilo de la 22-a I.J.K., kun multaj gravaj informoj, i.a. pri kelkaj aldonoj en la programo, pri pagmanieroj kaj pri la oratora konkurso. Tiu lasta temo pri:

- sento de internaciismo en la junularo.
- ĉu la nuntempa mondliteraturo fidele respegulas la vivon kaj la problemojn de la junularo?

- kian bildon vi havis pri Hungarujo antaŭ ol viziti ĝin, kaj kiel tiu bildo modifiĝis en la lando mem?

Jen bela okazo famiĝi por ĉiu, nenion farante krom paroli. Ne dubu pri viaj kapabloj; eventuale legu anticipe la libron "Retoriko" de I. Lapenna. Tiun investon oni regalos per premioj:

- 1-a premio: 1000 forintoj (ĉ. \$ 42,-)
- 2-a premio: 500 „ (ĉ. \$ 21,-)
- 3-a premio: 300 „ (ĉ. \$ 12,-)

Do: ne agu, sed nur parolu!

Petu la informilon ĉe: TEJO-Kongreso, p.f. 114, Pécs, Hungarujo.

Mallonge:

Hungarujo: En la Konstruteknika Universitato de Budapeŝto estas inaŭgurita Klubo de Esperantistaj Studentoj kun 40 membroj, kaj kurso por 30 studentoj, gvidata de Béla Gellén. (Adreso: Centra Klubo de Esp'istaj Studentoj, Műegyetem rkp.3. Kép. II. em. 66., Budapeŝto XI).

La Esperantoklubo "Sunradio" aranĝas kurson por 50 metilernantoj. Kursgvidanto: Béla Legény.

Sportklubo "Vörös Meteor" (Ruĝa Meteoro) fondis E-sekcion kun 25 junaj membroj.

En Szeged fondiĝis junulara E-klubo, kun 20 membroj. Gvidanto: Imre Székely.

Okazis 13-14 novembro en Budapeŝto la Unua Landa Kunveno de HEJ, inkluzive de Estrarkunsido. Maria Wenczel, gvidantino de la Turisma Fakto de HEJ, ĉeestis la Kongreson de la Itala Esperanto-Federacio en Rimini.


(ĉiuj: Inf. Fakto de HEJ)

Francujo: Dek francaj revuoj por junuloj ofte publikigas artikolojn pri kaj per Esp. Lastaj titoloj: D-ro Zamenhof (3 paĝoj, 2 desegnoj) – Primoŝten – Humoro sen landlimoj – La muelejoj de amikeco – Malto – ktp.

Instruisto el Coulommiers, s-ro M. Sujet, instigis siajn lernantojn verki afiŝojn pri la Jaro de Int. Kunlaboro. Li ricevis gratulojn kaj libropremiojn de Unesko.

(inf.: L. Giloteaux)

Inĝ. M. Savir gvidas lernejan E-kurson en Natanja, Israelo. Partoprenas ankaŭ eksterlandaj (i.a. afrikaj) studentoj.



EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *Daŭrigi la agadon iniciatitan* okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, laŭ la rekomendo de Unesko. Precipe proponi kunajn agadojn kaj aranĝojn al aliaj lokaj organizaĵoj laŭ la modelo de la elstara festo de la Tago de Homaj Rajtoj en Zagreb (vidu foton). Per ĉiuj eblaj rimedoj stimuli la daŭrigon de la subskribo-kampanjo (vidu p. 24).

2. *Mendi la novan Katalogon* de Elektitaj Libroj en Esperanto (vidu sube) por la klubo mem kaj ankaŭ por persona transdono al la loka (urba aŭ kvartala) biblioteko, kun la instigo tie fondi aŭ ampleksigi Esperanto-sekcion.

3. *Mendi kaj distribui* inter studentoj, do precipe en universitataj urboj, la novan eldonon de la 6-lingva (angla, franca, germana, hispana, japana, rusa) 10-paĝa faldfolio por universitataj medioj, kun subskriboj de 75 profesoroj. Vendata je kostprezo (po 0,07 gld. por ĉiu ekzemplero) ĉe la Centra Oficejo.

4. *Aranĝi oratoran konkurson* por la junaj membroj pri iuj el la temoj anoncitaj por la konkurso de la Universala Kongreso en Budapeŝto (vidu p. 34), por prepari al la partopreno en tiu lasta.

MODELA ARANĜO EN ZAGREB

Okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj la Tago de Homaj Rajtoj, kvin organizaĵoj en Zagreb, Jugoslavio, aranĝis komunan solenaĵon la 9-an de decembro. Inter ili troviĝis la Ĉefkomitato por Kroatio de Jugoslavia Esperanto-Ligo. La aliaj estis la Klubo por Unuiĝintaj Nacioj de Zagreba Fakultato, la Ĉefkomitato de Ruĝa Kruco por Kroatio, la Junulara Sekcio de Zagreba Observatorio kaj la Internacia Studenta Klubo de Amikeco.

Parolis d-ro Pavle Gregorić, membro de la Centra Komitato de KPJ, atomsciencisto ak. Ivo Supek, prof. Oton Pancer, prezidanto de la Ĉefkomitato de JEL por Kroatio, kaj aliaj. Sekvis kultur-arta programo. Aparta ekspozicio akcentis i.a. la kontribuon de Esperanto al internacia kunlaboro.


Informojn pri radio sendu al S-ro G. Largentier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la januaran numeron.

RADIO ROMA. 6-II, Italaj verkistoj: Luigi Capuana; 13-II, Italaj regionoj: Umbrio; 20-II, Italaj pentristoj: Tranquillo Cremona; 27-II, Leterkesto. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

RADIO PEKINO dissendas programon al Eŭropo vendrede kaj sabate de 20.00 ĝis 20.30, sed ne plu uzas la ondlongojn 45.70 m. kaj 30.14 m. Nur la aliaj kvar ondlongoj estas uzataj dum la vintra kaj printempa sezonoj. La programoj dissendataj sabate kaj dimanĉe estas direktataj al Japanujo kaj Koreujo de 11.00 ĝis 11.30 kaj al Sudorienta Azio de 12.30 ĝis 13.00; ŝanĝoj ankaŭ okazis pri la uzataj ondlongoj, sed ne estas precize sciigataj.

EL BRAZILIO, la stacio Radio Agulhas Negras en Resende daŭre dissendas de kvin jaroj ĉiusemajnan programon pri kaj en Esperanto prezentata de la loka grupo: merkrede de 18.45 ĝis 19.00.



UEA ELDONIS LIBRO-KATALOGON

Jus aperis belaspekta "Katalogo de elektitaj libroj en Esperanto", eldonita de UEA. La 64-paĝa kajero, en la formato de la Dua Bulteno de la Universalaj Kongresoj, unuavice celas atentigi publikajn bibliotekojn, internaciajn organizaĵojn k.s. pri la plej gravaj libroj nun aĉeteblaj.

Sur la dekstraj paĝoj de la Katalogo aperas po 4-5-linia priskribo pri ĉiu el 226 elektitaj libroj kaj 9 periodaĵoj, dum sur la maldekstraj paĝoj aperas reklamoj de diversaj Esperanto-eldonejoj. Por prezenti la enhavon al bibliotekistoj kaj aliaj, kiuj ne scipovas Esperanton, aperas sur la unuaj paĝoj klariga enkonduko en la angla, franca, hispana kaj rusa (krom

Esperanto mem). Komuna indekso de aŭtoroj kaj titoloj faciligas la serĉadon.

Tiun ĉi Katalogon UEA mem larĝe distribuas senpage: al ĉirkaŭ 300 gravaj bibliotekoj en ĉiuj kontinentoj, al la naciaj komisionoj por Unesko, al ĉiuj regulaj ricevantoj kaj abonantoj de la dokumentoj de CED, al regulaj klientoj de la Libro-servo de UEA, ktp. Tiel ĝi sendube havos ne nur komercan, sed ankaŭ gravan informan efikon ekster la Esperantomovado. Por ĉiuj aliaj, kiuj deziras posedi ekzempleron, estas fiksita prezo de 1,50 gld. (6 steloj) inkluzive de afranko. Oni mendu ĉe la Centra Oficejo (Libro-servo), Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.



esperanto
februaro 1966

MEMORIGA KALENDARO

Februaro

19-26 Unua Int. Skisemajno Krimml, Aŭstrujo
26-5/3 Dua Int. Skisemajno en Krimml

Marto

5-6 Svisa Kongreso Zürich
31 Limdato de la Belartaj Konkursoj 1966
Kongreskotizoj Budapeŝt plialtiĝas

Aprilo

1-8 Int. Kultura Semajno en Grésillon
10-11 Argentina Kongreso en Necochea
14-16 Int. Junulara Seminario, Toruń, Poll.
30 Limdato kandidatiĝo, Int. Ekzameno

Majo

14-20 IFEF-Kongreso, Utrecht, Nederlando
27-30 Brita (Jubilea) Kongreso, Norwich
27-31 Germana Kongreso en Bamberg
Dana Kongreso en Kopenhago
Konga Kongreso en Leopoldville
28-30 Franca Kongreso en Agen (L.-et-G.)
Belga Kongreso en Lovenjo
Sveda Kongreso en Skövde

Junio

3-5 Skota Kongreso en Alloa
30 Limdato por aliĝo al la U.K.

Julio

1-3 Kanada Kongreso en Montreal
1-31 Int. tendaro, montodomo "Esperanto",
Bul.
3- Sezono de Grésillon komenciĝas
3-28 Tendaro en Lančov, Ĉeĥoslovakujo
19-23 Hispana Kongreso en Bilbao
21-24 14-a Kongreso de ELNA, Washington D.C.
21-27 IKUE-Kongreso en St. Gallen, Svisujo
23-24 Aŭstria Esperanto-Konferenco, Graz
23-28 Dua Lerneja Konferenco, Graz, Aŭstrujo
23-30 22-a IJK de TEJO, Pécs, Hungarujo
23-30 KELI-Kongreso, Debrecen, Hungarujo
23-30 SAT-Kongreso, Swanwick, Britujo
26-30 Ferioj de AEF en Klosterneuburg
30-6/8 51-a Universala Kongreso, Budapeŝt

Aŭgusto

4-10 Eŭropa Ferio-Semajno, Boldern, Svis
7-13 Naturamika rondvojaĝo tra Aŭstrujo
10-20 Int. Pedagogia Seminario, Szeged

oficiala informilo
n-ro 387, 1 jan. 1966

KOMUNIKO DE LA PREZIDANTO

Pro studvojaĝo en pluraj landoj mi forestos el mia hejmo dum kelkaj monatoj en printempo kaj aŭtuno. Tial, ekde marto ĝis la fino de 1966 anstataŭos min la vicprezidanto, s-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando. Ĉar ankaŭ s-ro Wensing estas tre okupita, oni bonvolu sin turni unuavice al la C.O. en Rotterdam, aŭ al la ĝenerala sekretario s-ro Becker. Mi afable petas nepre ne skribi al mi, ĉar dum tiu periodo neniu letero adresita al mi povos estis pritraktita.

IVO LAPENNA

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de decembro 1965 kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de decembro 1964:

	1964	1965
Asociaj membroj	25 167	24 081
Individuaj membroj		
MJ	879	923
MA	4929	4923
MS	367	367
Pat.	1	—
DM	553	575
HM	35	34
J-MJ	39	42
J-MA	208	219
MA-K	120	165
	7 131	7 248
	32 298	31 329

La statistiko montras kontentigan kreskon de pli ol 100 individuaj membroj. Plej multe kreskis MJ kaj MA-K. En la unua kategorio plej ofte aliĝas novaj esperantistoj, ĵus forlasintaj kurson. La dua montras ĝojigan fortikiĝon de la junulara sekcio. Denove ni povas konstati, ke pliaj membroj ekkomprenis la avantaĝon de la dumviva membreco. Tiu rekomendinda kategorio daŭre kreskas.

Kvankam pluraj landaj asocioj kreskis je kelkaj centoj da membroj, la nombro de

asociaj membroj falis je preskaŭ 1000. Tio ŝuldiĝas ĉefe je konsiderinda membroperdo en Hungarujo. Ni varme esperas ke la ĉijara kongreslando sukcesos baldaŭ restarigi la antaŭan situacion kaj eĉ superi ĝin en tiu ĉi jaro tiel favora por la movado en tiu lando.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

DANKO PRO BONDEZIROJ

Ankoraŭ alvenadas en la Centra Oficejo en Rotterdam kaj en la oficejo de CED en Londono granda nombro da kartoj kaj leteroj kun jarfinaj bondeziroj. Ĉar bedaŭrinde ne eblas al ĉiu sendinto respondi aparte, ni uzas ĉi tiun rimedon por plej sincere danki kaj reciproki la bondezirojn por harmonia kaj fruktodona jaro 1966!

LA POŝTMARKKOLEKTADO

Ni kore dankas al tiuj, kiuj kolektas poŝtmarkojn por UEA. Venis en 1965 proksimume la kutima kvanto. La premiitoj estas:

- 1) La novzelandaj esperantistoj — pere de s-inoj Rita Aagaard kaj Y. M. Canty.
- 2) Oomoto, Japanujo.
- 3) S-ino W. Addis, Aŭstralio.
- 4) D-ro T. R. H. Berrie, Britujo.
- 5) S-ino E. James Yuhasz, Usono.

Libropremioj estas senditaj al supre menciitaj kontribuantoj. S-ro Peter Zacho, Fredensvej 9, Espergærde, Danlando daŭre akceptas ĉiuspecajn poŝtmarkojn.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1965

Stato je la 31-a de decembro

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2365	2660	112,47
2. Belgujo	1770	1975	111,58
3. Usono	3827	4072	106,40
4. Japanujo	3745	3965	105,87
5. Jugoslavio	3295	3478	105,56
6. Francujo	7009	7257	103,54
7. Svislando	1800	1860	103,33
8. Hispanujo	2804	2860	102,—
9. Germanujo	6551	6635	101,28
10. Danlando	2704	2732	101,04
11. Nederlando	5140	5166	100,51
12. Svedujo	6190	6090	98,38
13. Britujo	6053	5818	96,12
14. Brazilo	3411	3265	95,72
15. Italujo	3932	3660	93,08
16. Norvegujo	1490	1360	91,28

Konkurso II

1. Aŭstrujo	1090	1270	116,51
2. Kanado	720	769	109,54
3. Aŭstralio	1288	1318	102,33
4. Sudafriko	250	245	98,—
5. Nov-Zelando	1195	1166	97,57
6. Argentino	760	725	95,39
7. Israelo	405	360	88,89
8. Islando	250	215	86,—
9. Madagaskaro	250	120	48,—
10. Portugalujo	380	120	31,58
11. Urugvajo	250	65	26,—

Venkis do Finnlando kaj Aŭstrujo, al kiuj ni tre kore gratulas, precipe al iliaj agemaj ĉefdelegitoj, S-roj Vilkki kaj Rentmeister, al kiuj sendube grandparte ŝuldiĝas la bonega rezulto. Je dispono de ambaŭ landoj estas, kiel kutime, librodono en la valoro de 100,— gld. Ni deziras komplimenti ankaŭ Belgujon, je kiu Finnlando venkis nur per "nazlongo".

Ni varme rekomendas ĉiujn ĉefdelegitojn kaj perantojn sekvi ilian ekzemplon de energia varblaboro, precipe nun, kiam ni lanĉis la kampanjon por nova milo da individuaj membroj. Kun ĉies helpo tiu celo certe estos atingebla.

Ni ĝojas, ke praviĝis niaj lastjaraj atendoj rilate la ĝeneralan rezulton. La plimulto pasis la kvoton, tiel ke en Konkurso I preskaŭ tri kvaronoj atingis pli ol 100%. Ni esperas kaj fidas, ke ankaŭ en 1966 tio povos esti atingita.

Tiurilate certe helpas nova principo por fiksi la kvoton. Ĝi ne estos, kiel antaŭe, la poentaro atingita en la lasta jaro, sed kiel kvoton por 1966 ni konsideros la plej altan poentaron atingitan en la lastaj kvin jaroj. Ni atendas, ke tio ankoraŭ kontribuos al pli objektiva prijuĝo. Do, ek al intensa varbado!

Kiel kutime, en Konkurso I partoprenas landoj kun pli forta, en Konkurso II landoj kun malpli forta movado. Por la Konkursoj 1966 validas, do, kiel kvotoj la plej altaj poentaroj atingitaj en la lastaj kvin jaroj. La poentoj estas donataj laŭ la jenaj valoroj: AM = 1

poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt; MA, MA-K kaj J-MA = 10 pt; MS = 15 pt; Pat. kaj DM = 50 pt.

Kun bondeziroj por granda sukceso.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

De Sassi, s-ro M., Zürich, Svislando.
Hirayama, s-ro Tomohiro, Mitaka, Japanujo.
Kvalvaag, s-ino Vigdis, Stavanger, Norvegujo.
Madsen, s-ro Lauge, Kapp, Norvegujo.
Manceau, s-ro J., Creutzwald, Francujo.
Sjöblom, s-ino Brita, Malmö, Svedujo.
Verloren van Themaat, d-ro W. A., Nederlando.
368 Lambert, s-ro D., Francujo.

MEMBRO-SUBTENANTO 1965

368 Lambert, s-ro D., Francujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

22 Blume, s-ro Arne; 23 Jensen, s-ro J.P.; 24 Kehlet, s-ro Torben, Danlando. 25 Kettunen, s-ro O.; 26 Vilkki, s-ro Joel, Finnlando; 27 Belhoste, s-ro L.; 28 Dabezies, s-ro H.; 29 Pera, s-ro Jean; 30 Yelland, s-ro E.E., Francujo; 31 Jolliet, s-ro Leo, Germanujo; 32 Majcenović, s-ro Mijo, Jugoslavio; 33 Baaten, s-ro W.; 34 Laverman, f-ino A.A.; 35 Luyke, s-ro H.C.; 36 Mast, s-ro J.L.; 37 d'Oliveyra, s-ro A, Nederlando; 38 Almén, s-ro Helmer, Svedujo; 39 Ammann, s-ro Karl; 40 Bouvier, s-ro P; 41 Grutter, s-ino L.; 42 Jayet, f-ino E., Svislando.

DONACIOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Nederlando: Beekhuysen, s-ro B.R., 4,85.
Norvegujo: de Caspary, s-ino Pepita, 1,—.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Germanujo: Jolliet, s-ro Leo, 7,—. Nederlando: ten Cate, s-ro H.J., 5,—; Kuiterman-v. Goor, s-ino N.C., 10,—. Svedujo: Anderson, s-ro Gustav, 10,41. Nederlando: Waterbolk, f-ino G., 10,—.

Sumo entute ricevita: 21540,54 gld.

Sumo elspezita: 18130,89 gld.

Saldo pozitiva: 3409,65 gld.

FONDAJO CANUTO

S-ro Aug. Rossini, Italujo: 1 J-MJ.

FONDAJO ZAMENHOF

F-ino B. F. Kliphuis, Nederlando: 10,— gld.

FONDAJO AZIO-AFRIKO

Germanujo: Schindler, s-ro H., 20,— gld.
Nederlando: Kalis, f-ino A.J.M., 40,50 gld.
Usono: Wesser, s-ro Alex, 4,29 gld.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1966

(Vidu "Esperanto", majo, p. 94)

A. (16.— gld.): 2. Mawson, s-ro F., Britujo;
3. Peine, s-ro O., Germanujo; 4. Lewis, s-ro H. J., Kanado; 5. Moerbeek, s-ro R., Nederlando.

FONDAJO JUNULARA GAZETO (Gld.)

Aŭstrujo: A. E. J., 0,90.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

oficiala informilo

esperanto
februaro 1966

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Ĉu vi serĉas malnovajn, rarajn librojn kaj jarkolektojn de revuoj? Se jes, vi povas elekti el 2000-voluma biblioteko. Sendu vian dezirliston al la peranto: s-ro Roger Iserentant, Kerklaan 61, Brugge, Belgujo.

Ni diskutos "Kiel difini demokration" 1. IV. 1966. Skribu al Studenta Esperantoklubo p/a Sandelin, Vårvädersväg. 6B:709, Lund, Svedujo.

Kunlaborantoj petataj el ĉiuj landoj por interŝanĝi unuataĝajn kovertojn (dek aŭ pli) aŭ kontraŭ belaj hindaj poŝtmarkoj; reciproka rekompenco laŭbezzone. Esperanta Filatela Servo, P.O. Box 604, New Delhi, Hindujo.

Nekatolikaj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Esperantlingvaj urboprospekto, unutagkoverto kun E-stampita poŝtmarko kaj 36 glumarkoj kostas nur 6 respondkuponojn. Esperanto-Societo Düsseldorf, 4005 Buderich, Neusser Str. 33, Germanujo.

1906-1966, Bonvolu tuj saluti Diamantan Jubileon de Sheffield-Esperanto-Societo, 18, Bents View, Sheffield. 11., Anglujo. Sendu amase por ekspozicio.

Prepare al 1966-a Usona Kongreso mi deziras akiri interŝanĝe aŭ aĉete ĉiulandajn popolajn muzikpecojn kun Esperantaj vortoj, notoj kaj akordoj. Fakdelegito Sergio Docal, 2947 Tilden St., NW, Washington 20008 DC, Usono.

Per genia pensado la scienco evoluigis esplormetodon, kiu garantias maksimumon de certeco. Ĉu tiu metodo estas aplikebla en kreado de objektiva vivkoncepto? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Sveda Popoldanco 10 malsimilajn kolordia-pozitivojn 3 usonaj dol. S-ro Erik Carlsson, Långgatan 30, Skövde, Svedujo.

34-jara samideanino deziras korespondi kun la tuta mondo, ĉefe pri lingvoj aŭ filozofio. S-ino Siw Shepherd, N. Bergvägen 6, Skövde, Svedujo.

Deziras trovi korespondantojn el ĉiuj landoj, cele kolekti folklorajn pupetojn (altajn 18 cm.) por ekspozicio. Certa respondo. Skribu al Canat Paul, 4, Rue Gambetta 77, La Ferte sous Jouarre (Francujo).

Mi starigis Esp.-Muzeon kaj mi posedas bibliotekon kun mil volumoj pri nia lingvo. Eble oni povus helpi min per la sendado de libroj kaj revuoj. Indiku viajn dezirojn kaj emojn. S-ro Luis Ma Hernandez Izal, farmaciisto, Apartado 83, Vilafranca del Panades, Hispanujo.

JARLIBRO 1965 DUA PARTO

Per tio ĉi ni informas, ke je nia granda bedaŭro la dua parto de la Jarlibro suferis gravan prokraston pro diversaj cirkonstancoj. Ni ekspedos ĝin en proksimaj tagoj. Ni sincere petas pardonon de la membroj pro tiu ĝeno.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.



kvaronjara
junulara
gazeto

jarabono 8 gld.

SEN PAGE

dum 1966, se vi pagis kiel MA kaj naskiĝis en 1941 aŭ poste.

Tuj informu nin pri la dato de via naskiĝo !

ĈU VI JAM VARBIS NOVAN MEMBRON POR 1966 ?

H.C. ANDERSEN



LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERESTRO
KAJ DU ALIAJ FABELOJ

numuraj kaj sagaj fabeloj por
plenkreskuloj. Luksa libro en
granda formato kun multaj ko-
loraj ilustraĵoj.

Prezo nur 30 steloj.

Eldonejo Koko - Kolby Kaas



Danlando

Petu la senpagan Koko-revuon.

LINGVOLOGIA REVUO

Esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio, la kalkuleca lingvoscienco. La unua numero aperinta. Aperos dufoje en jaro. Estos senpage sendata de la eldonanto kaj redaktoro Emil Hanhiniemi, P. O. Box 764, Ingham, N. Queensland, Aŭstralio.




LA UNUA NATURSCIENCA REVUO EN LA INTERNACIA LINGVO

Abono per UEA:
5,40 gld. aŭ
1,50 us. dol.
jare (3 n-roj)

NOVA ELDONO EN LA FAMA SERIO ORIENTO-OKCIDENTO (N-RO 6)

REĜO LEAR



Bind.	160
16,50 gld.	paĝoj
Broŝ.	21 x
14,— gld.	15 cm.


Unu el la plej grandaj kaj emociaj dramoj de William Shakespeare, **REĜO LEAR** nun aperis en la definitiva traduko de

K. KALOCSAY,

memore al la 350-jara datreveno de la morto de la aŭtoro. Brilkvalita teksto, bela bindo, formato de "Naŭzo", "Kalevala" ktp.

Eldono de Universala Esperanto-Asocio

LEGU



de UEA - jarabono (4 n-roj) 15,- gld.

KOMPLETAJ JARKOLEKTOJ

REVUO ESPERANTO 1965 tolbindita volumo, ora surpriso, 224 + 48 paĝoj, konservindaj artikoloj.

Por MA 1965: 7,— gld.; por aliaj: 14,— gld.

LA PRAKTIKO 1965: 7,50 gld. nebindita jarkolekto, 176 grandaj paĝoj, multaj ilustraĵoj.

Speciala oferto: jarkolekto 1964: 5,— gld.

Rapidu! Ambaŭ kvantoj estas limigitaj!

APERIS NOVA ELDONO

de la 6-lingva (angla, franca, germana, hispana, japana, rusa) 10-paĝa faldfolio por informado en universitataj medioj.

Trafa, serioza enhavo.

Subskriboj de 75 profesoroj en 27 landoj.

Prezo: po 0,07 gld.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA. Utiligu dum la subskribo-kolektado en la universitatoj!

Jam de 1965 aperas en granda formato. Abonu nun!


Eldono de KOSMO Traduko de T. Nakamura

Okakura kakuzo

LA LIBRO DE TEO

Studolibro pri orientaj ideoj kaj idealoj

142 p.
luksa
prezento



\$ 2,50
9,— gld.
36 st.

*"Kiam venis Enciklopedieto Japano, mi estis konvinkita, ke tiu libro estas apenaŭ super-
ebla. Sed jen La Libro de Teo ĝin superatutis!"*

Juan Régulo-Pérez


Sola vendrajto ekster Japanujo: UEA

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de
Mihail Lermontov, la granda majstro de la
rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn
rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj en
Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,— gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia
kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin
kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj
kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski



368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilu-
stritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj
kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama
finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de
"Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de
Oogai".

Prezoj:

kun leda dorso 35,— gld (140 st)
tuttole bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

Ĉu vi serĉas revuon

*kiu enhavas interesajn artikolojn pri
popularaj temoj,
kun grandformataj trafaj ilustraĵoj,
kiu vere "instruas kaj amuzas"?*

Do vi bezonas la monatan bildrevuon

LA PRAKTIKO

*La administra maŝino de Universala Espe-
ranto-Asocio kaj la redaktado de s-ino E.
Burgler-Jezsó garantias regulan, akuratan
aperadon kaj aktualan enhavon.*

Jarabono 1966: 10,— gld. (40 steloj). Kotizu per
via kutima peranto, aŭ rekte al UEA.